

Bonvenon al la Muzeo da Biblio!

Unue, mi prezentas du vortojn--pregxejo kaj eklezio. Eklezio estas grupo de kredantoj, organizacio. Pregxejo estas konstruajxo kie kredantoj prexas au adoras. Do, ni povas diri ke unu eklezio kunvenas en unu pregxejo. :-)

Tiu cxi eklezio estas unu de la plej fruaj eklezioj en Tajvano. La unua kristana misiisto estis Skotlanda kuracisto. La unua eklezio kiun li komencigis estis en QiJin(旗津島), la insulo apud Kaohsiung. Poste, unu eklezio estis komencita en LiGang(里港), apud Pingtung. Kredantoj de Pingtung marsxis al LiGang (pli ol dek kvin kilometroj) por kunveni. Poste, ili komencigis eklezion en Pingtung. Post kiam la numero de kredantoj kreskigxis, ili konstruis tiun cxi pregxejon en tero kiun kredanto donis al la eklezio.

Kristanoj kredas je unu Dio kiu faris cxion. Ni vidas en la tutaj kreaĵoj kia Dio Li estas, sed ne klare. De antaux tri mil kvarcent jaroj, Dio komencis paroli kun homaro tra la Biblio. Efektive, la Biblio estas pli ol unu libro. Gxi estas biblioteko, kaj la partojn ni vokas "librojn." Unue, Dio movis Moseon, Judion kiu naskigxis en Egiptujo. Li skribis kvin librojn kiuj formis la fundamenton de la tuta Biblio kaj de nia kredo. Mi ripetas ke Moseo estis homo de mil kvarcent jaroj antaux Kristo. Li uzis la hebrean lingvon.

Poste Dio movis kvardek aliajn homojn skribi librojn de la Biblio. La pli frua parto de la Biblio estas en la hebrea lingvo au aramaika lingvo. Ni vokas tiun cxi parton La Malnovan Testamenton. La malpli frua parto de la Biblio estas en la greka lingvo. Ni vokas tiun parton La Novan Testamenton.

Hodiaux ni ne havas la originalajn manuskriptojn de la Biblio. Dum la multaj jarcentoj ekde la skribo de la libroj de la Biblio, multaj homoj kopiis tiujn librojn. Hodiaux ni havas multajn milojn de manuskriptojn.

Plue, dum multaj jarcentoj multaj homoj tradukis la Biblion en diversajn lingvojn. La unua traduko estis la greka. Cxar Judioj en Egiptujo komencis preferi paroli greke, ili tradukis la malnovan testamenton en la grekan. Pro legendo ke sepdek du homoj tradukis gxin, ni vokas tiun tradukon La Septuaginton(七十士譯本).

Post kiam Jesuo supreniris al cxielo, Kristanoj tradukis la Biblion en aliajn lingvojn. La Aramaika lingvo esitigxis la Siriaka lingvo. Kristanoj tradukis en la Siriakan, kaj la Siriaka traduko havas specialan nomon--Pesxiton.

En la okcidenta parto de la Roma Imperio, plej homoj ne plu parolis la Grekan. Ili preferis la Latinan. En la kvara jarcento, Jeromo tradukis la Biblion en la Latinan. La Latina traduko nomigxas Vulgata. Dum mil jaroj, la Vulgata estis la plej grava traduko en okcidenta Euxropo. Ecx hodiaux la Romkatolika Eklezio ankoraux uzas tiun tradukon.

Dum la protestanta Reformado, en la deksex jarcento, Martino Lutero tradukis la Biblion en la germanan. Li ne tradukis gxin en akademian lingvo sed en la lingvon de la komunaj homoj. Li ofte iris al la merkato kaj demandis, "Kiel vi esprimas tiun ideon?" Do lia traduko estigxis remarkinda. Cxar Germanio havas multajn dialektojn, la traduko por Martino Lutero igxis fundamento de la unuigxinta lingvo de la germana-parolantaj.

En mil okcent sep (1807) misiisto de la Unuigxita Reglando venis al Cxinio. Li tradukis la Biblion en klasikan cxinan lingvon cxar ne multe da homoj povis legi, kaj la literaj homoj legxis klasikan cxinan (高文理), ne familiaran cxinan. Poste li, kaj aliaj misiistoj renkontis grandan problemon--se nelitera homo kredis je la kristana religio kaj deziris lerni legi la Biblion, ili ankoraux ne povis legi klasikan cxinan tradukon. Kion povis la misiistoj fari? Ili tradukis la Biblion en pli simplan klasikan cxinan (淺文理). Do la

edukitaj cxinanoj ankoraux volis legi gxin kaj la ne-edukitaj povis legi gxin. Dum la fruaj jaroj de la dudek jarcento multe da cxinanoj promovis la familieran cxinan(白話文). Kristanoj tradukis la Bibliion en familieran cxinan kaj finigxis gxin en mil naux cent dek naux jaro (1919). La venonta jaro estos la centa datreveno de tiu traduko (和合本). Cxar malfruaj libroj kiujn cxinanoj skribis estis en klasika cxina lingvo, tiu traduko de la Biblio igxis grava literara verko en cxina kulturo. Gxi estas libro kiu unuigxis cxinaj legantoj per tuta lando de Cxinio. Gxis hodiaux cxinaj kristanoj tra la tuta mondo legas tiun tradukon, ecx se ili parolas malsamajn cxinajn lingvojn.

Mi esperas ke vi trovos la du tradukojn en la Tajvana lingvo. En mil nauxcent tridektri la Tajvana traduko aperis. Cxar la plejparto de la homoj en Tajvano kaj en la cxeflando de Cxinio kiuj parolis la Tajvanan ne povis legi iun ajn lingvon, kaj la literaj en Tajvano cxeestis lernejon per la Japana lingvo, tre malmulte povis legi la Tajvanan lingvon. Do, la misiistoj tradukis en romanajn gravulojn. La literaj kaj ne-literaj povis lerni romanajn gravulojn pli rapide ol lerni la cxinajn gravulojn. Tamen, post multaj dekjaroj de edukado per la mandarena lingvo, ambaux en Tajvano kaj en la cxeflando de Cxinio, kaj en Singapuro kaj Malaysio, bezonis novan edicion de la Tajvana Biblio. En mil nauxcent nauxdekses nova edicio de la Tajvana Biblio aperis--la sama traduko sed en cxinaj gravuloj.

Bonvolu rimarki Bibliion kiun patrino donis al sxian filon kiu laboris kiel cxasisto de balenoj. Gxi estas en tiu vitra kaso.

Bonvolu rimarki Bibliion kiun la antauxa prezidanto de Tajvano Lee Teng-Hui portis dum tridek jaroj. Gxi estas en tiu vitra kaso.

Vi povas vidi Bibliion kiun 高俊明 legis en malliberejo.

Ni taksas du-lingvajn Bibliojn, cxefe la tradukojn kun la originalajn lingvojn kaj modernan lingvojn. En tiu kaso, ni vidas du-lingvajn Bibliojn en la hebrea kaj greka kaj en la angla.

En tiu cxi muzeo vi povas vidi multajn tradukojn--de diversaj partoj de la mondo. Notu la tablon de la tradukoj de la Filipinoj. Notu la diversajn cxinajn tradukojn--mandarenan, tajvanan, hakkan, kaj kantonan. Notu la tradukojn en la indigxenaj lingvoj de Tajvano--Tajal, Truku, Lukaj, ktp.

Mi ankaux preparis ludon-cxason. Bonvolu sercxu tiujn cxi tradukojn. Mi esperas ke gxi estus amuze.